



La Mondo, 1566



# Esperanto sub la Suda Kruco

Majo-Junio 2000  
Numero 45 (vol. 8, no. 3)



ISSN 1039-9380

# Esperanto sub la Suda Kruco

Oficiala organo de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj  
Numero 45 (volumo 8, numero 3), Majo-Junio 2000

Redaktoro: Donald Broadribb  
PO Box 643, York WA 6302, Aŭstralio

☎: (08) 9641 1937

Faksoj: (08) 9641 1134

E-poŝto: [donaldbroadribb@mac.com](mailto:donaldbroadribb@mac.com)

## Libroservo

Libroservo de AEA, Esperanto-Domo, 143 Lawson St Redfern, NSW 2016, Aŭstralio. E-poŝte: [libroservo@ans.com.au](mailto:libroservo@ans.com.au)

## Korespondaj kursoj

Hazel Green, 44 Towoomba Road, Oakey Qld 4401, Aŭstralio. E-poŝte: [hazgreen@tmba.design.net.au](mailto:hazgreen@tmba.design.net.au)

## SE VI DEZIRAS LEGI PRI IO, VERKU ARTIKOLON!

Jes, ĉu vi ne ofte pensis kiam vi elkovertigis vian novan ekzempleron de *Esperanto sub la Suda Kruco*: "Ni vere bezonas artikolon pri ...?" Do sendu tiun amatan eseon, ideon, rakonton, esprimon de vidpunkto, leteron, desegnaĵon, foton. Vi povas sendi vian kontribuon per e-poŝto, sur komputila disko (Mac aŭ MS-DOS [nur 3½"]), aŭ sur papero. Se vi sendas sur papero, la teksto devas esti klare tajpita per freŝa rubando. Tajpu sur nur unu flankon de ĉiu folio, kun ekstra spaco inter ĉiuj linioj. Ne tajpitajn manuskriptojn ni ne akceptas.

La redaktoro rajtas redakti, korekti kaj konformigi al la stilo kaj kutimoj de ĉi tiu gazeto ĉiun tekston antaŭ aperigo. Laŭbezone teksto povas esti mallongigita. Pri la enhavo de artikolo respondecas nur ĝia aŭtoro.

## EN ĈI TIU NUMERO

### Artikoloj:

Deziras korespondi . . . . .	7
Nia bildaro . . . . .	8
Ekzamenoj; Nekrologo; Mi ne dormis (J. Rezende Piton) . . . . .	10
UEA membrostatistiko . . . . .	11
Vojaĝstipendio Einihovici . . . . .	12
Honesta knabineto (rakonto) . . . . .	13
Aŭstralia sekcio de ILEI . . . . .	14
Ĉu vi jam aŭdis ĝin? . . . . .	15
<i>Kio kaj kiu</i> (M. Leereveld) . . . . .	17
Kelkaj konsiloj por plibonigi stilon (V. Melnikov) . . . . .	18
Diversaĵoj . . . . .	19
Analoj de 1999 (Diplodoko) . . . . .	21
Eseo-konkurso en Novzelando . . . . .	23
Nova ekspozicio (J. Bishop) . . . . .	24
Nova pardonpeto de Odlo Bokserp . . . . .	26

### Recenzoj:

<i>La Bahaa kredo...</i> (V. Payne); <i>La laboro de UEA por pli paca mondo</i> (DB); <i>Almanako, Kalejdoskopoj, Damnita Lando</i> (M. Leereveld); <i>Apartaj mondoj: verboj kaj participoj, Gramatiko de Esperanto</i> (DB) . . . . .	5
---	---

## English Supplement

ESK estas legebla per la Interreto:  
<http://www.poboxes.com/esk/>

Limdato por artikoloj por la julia numero: 16 junio.

Kovrilbildo: Mondomapo, 1566. Vidu p.25.

## *La Bahaa kredo kaj Esperanto realigantaj la mondan pacon*

Recenzas Vera Payne

**Paul Desailly:** *La Bahaa kredo kaj Esperanto realigantaj la mondan pacon*. Private eldonita de la aŭtoro, 2000.

Laŭ Paul Desailly, ĉi tiu verko estas la kulmino de naŭ jaroj da laboro, kaj Esperantigita dank' al kunlaboro de multaj geamikoj. Li celis, per la origina Angla versio, instigi Bahaanojn ekstudi Esperanton serioze. La Esperanto-versio haveblas ĉe Edna Turvey [36 Calder Road, Darlington NSW 2008].

En mallonga biografio, amiko Howard Perkins diras ke la antaŭe enradikiĝinta ateisto fariĝis Bahaano en 1989, kaj Esperantistiĝis iom post tio.

Paul Desailly taksas sian religion plej alte kaj la internacian lingvon preskaŭ egale. Lia etendiĝinta familio apartenas al ambaŭ sferoj kaj, kompreneble, li plej ĝojas kiam la du kunfandiĝas. Lia sento de honoro certigas honestecon kaj precizecon en la verko, sen pedanteco.

Tamen, lia lingvuzo estas ege respektoplena, eĉ adorema, eble por kelkaj iomete troa, ekzemple “Li kiu estas la Sapiro de la mondo”, “glora, majesta revelacio”, kaj eĉ “nia trezora” kaj “nia benita” (lingvo, Esperanto).

“Elektu vi unu lingvon...komunan.” Baha'u'llah kredis ke unu komuna lingvo, aŭ helplingvo, kaŭzos unuecon kaj fariĝos ilo por antaŭenigi harmonion inter la homaro. Laŭ Abdu'l-Baha, ĉiu Bahaano devas studi Esperanton kaj disvastigi ĝin laŭ sia eblo. En piednoto montriĝas ke la koncerna prelego ne estas oficiale

aŭtentigita. Tamen, asertas Paul Desailly, estas multe da atestaĵo por subteni la imperativan modon “devas”.

Sed Bahaanoj devas akcepti kiel universalan lingvon kiun ajn la cetero de la mondo elektas. Grandiozironie, la Anglan lingvon, tiun ilon de koloniismo kaj komercismo, verŝajne al si ankaŭ prenis la Bahaanoj. (Konfesindas ke Esperanto ne povas tiel nete prezenti: *God-Good, Devil-Evil.*)



Paul Desailly

Paul Desailly pasie skribas ke Bahaanoj devus lerni kaj uzi Esperanton ne nur pro la dekreto de Baha'u'llah, sed ankaŭ “simple ĉar la i.l. estas verkita facila — ĝi estas la plej bona lingvo ĝis nun konata por doni al ĉiuj egalajn valoron kaj respekton, kaj ĝiaj bazoj kaj celo estas tutmondaj paco kaj justeco.”

Proprasente Paul Desailly eltrovis ke “Multaj sciencistoj kaj teknikistoj en la Oriento povas Angle verki, foje per helpo de lingvisto, sed ili ofte apenaŭ kapablas paroli koheran frazon en tiu lingvo, se ne temante sciencan.” Li demandas: “Ĉu tio estas akceptinda rolo por vere universala helpla lingvo?” Plaĉas al mi lia opinio ke

Esperanto estas “genie malkomplika, ne fuŝe simpla.”

Li klarigas ke li neniam aŭdis dum siaj multaj Aziaj vojaĝoj la opinion ke Esperanto estas tro okcidenta. “Regas en Esperantujo konsultado kaj kompato”, kiujn priskribas Baha’u’llah, “la ĝemelaj brilegoj de saĝeco”. Li ilustras la gradon de malfacileco de la Angla por, ekzemple, Japanoj. Kaj eĉ la malfacilecon vere kompreni la Anglan en okcidenta Eŭropo!

Abdu’l-Baha antaŭvidis ŝanĝojn al Esperanto, opiniante ĝin en 1911 “en sia nuna formo tro malfacila por kelkaj”. Paul Desailly aldonas: “Estus tragedio se iuj obstinaj Esperanistoj neniel konsiderus la eblecon ke la i.l. povus bezoni ŝanĝojn aŭ ŝanĝetojn. Laŭ miaj multaj travivaĵoj en Esperantujo, tia malcedemo evidentigis en eta sed ekstermodere voĉa malplimulto de Esperanistoj”.

Bahaanoj jam suferis multe por kaj pro sia kredo. Subpremo, torturo, mortigo, precipe en Irano, atestas al la forto de la movado kaj la timo kiun ĝi inspiras en tiranoj. “Ho amiko! En la ĝardenon de via koro plantu nemon krom la rozo de la amo...La ĉiela nutraĵo estas scio, interkompreno, fido, certeco, amo, parenceco, afableco, pura intenco, kor-altiriĝemo, kaj la kuniĝo de animoj.”

La impetopreĝo de Abdu’l-Baha, kvazaŭ fasonita por Paul Desailly, petas “...por gracie helpi min servi Vian Aferon, disvastigi ĉien Viajn Instruojn kaj laŭdegi Vian Vorton tra la tutaj Oriento kaj Okcidento.” Kaj indas citi la konsilon de Baha’u’llah: “Estu serioze okupita pri la bezonoj de la epoko, en kiu vi vivas kaj koncentriĝu viaj intencoj je ties krizokazoj kaj postuloj”. Kiu, eĉ nekred-


anto kia mi, povus nei tion? Kaj tre aprobinda estas la admono ke “nia fido iĝu agado”. Paul Desailly kritikas la partianan sintenon fare de neveraj (sed deklaritaj) kredantoj, ĉe kiuj la pozitivaj ecoj ne speguliĝas en iliaj faroj.

Mi trovis kelkajn esprimojn kiujn mi ŝanĝus, kaj unu-du strangajn vortojn kia “brelokojn”<sup>1</sup>. Mi plurfoje legis la lastan frazon sur p.31 sed ankoraŭ ne komprenas ĝin. Ne tute plaĉas al mi la alfabeto-ekzemploj (b=bor, ĝ=jaw). Prefere *Inuita* anstataŭ *Eskima*. Tri demandosignoj enkapiĝis al mi post kiam mi legis pri “la morto de mia karulo”. Sed la negativajoj estas bagatelaj.

Ne mankas humursento, ekzemple kiam li priskribas la embarasajn situaciojn kiam oni kriegas “kvazaŭ kompreno dependus de sonego”, kaj ankaŭ kiam li faras promeson koncerne necesejpaperon!

Tralego rekompencos. Estas multaj citaĵoj kaj Bahaaj kaj Zamenhofaj kiuj pripensigas kaj kortuŝas. Oni lernas multe pri la admirinda Bahaa kredo, kaj refreŝigas al si la historion de Esperanto. Plenkoloraj fotoj ornamas. Paul Desailly fariĝis vera Civitano de la Mondo. Li esploris siajn ideojn kaj faktojn dumjare. Mi trovis la verkon stimula.

Kia bona diskutilo por la Somerkursaro! □



<sup>1</sup> “**Breloko:** Juveleto, ornamaĵeto pendanta de koliero, ĉeno de poŝhorloĝo ktp.” [PIV]

## ALIAJ RICEVITAJ LIBROJ

**Ulrich Lins:** *La laboro de Universala Esperanto-Asocio por pli paca mondo.* Rotterdam: UEA, 2000. 12p., broŝ. Takso: 🍷🍷🍷🍷.

Surprize interesa libreto, kiu skizas la porpacajn agadojn de UEA ekde ĝia fondiĝo ĝis nun. Efektive, tre impona agadaro, modeste kaj klare prezentita, nek blage nek troige. Mi tre rekomendas ĝin.

[Donald Broadribb] ☐

**Almanako.** La negranda urbo Prilep ne estas la oficiala ĉefurbo de Makedonio (ĝi estas Skopje), sed ĝi certe estas la ĉefurbo de la Esperanta aktiveco. Nun ĝi havas, krom la malnovan “Esperanto-Societo *La Progreso*” ankaŭ 30-membran “Junulara Esperanto-Societo *Estanto*”. Ĉi-lastaj ĵus eldonis *Almanako*-n, kiu enhavas multajn informojn pri nuntempa Prilep, pri la historio de Makedonio, kaj pri la historio de la Esperanta movado en la lando. La gramatikaj eraroj estas nemultaj, nek la preseraroj. Ĝi enhavas plurajn bildojn.

Tre interesa libro.

[Marcel Leereveld] ☐

**Viktor Galeski:** *Kalejdoskopio.* Eld. La Progreso [vidu supre!] La libreto enhavas duonan centon da poemoj ate de Viktor Galeski, la filo de la ankoraŭa Esperanto-pioniro Prilepa Prof. Metodi Galeski. Ĉi tiu poezio reprezentas la sonĝojn kaj revojn kaj spertojn de la poeto, en tute libera forma poemado. La temoj estas tre disaj kaj tre sentecaj, kaj la vortoj fluas kiel kvietra rivereto, sen abrupt aĵoj.

[Marcel Leereveld] ☐

**Petar Baŝeski:** *Damnita lando.* Eld. La Progreso. Kolekto de 26 poemoj de la konata poeto Petar Baŝeski, tradukitaj en Esperanton. La poemoj donas kulturan kaj folkloran bildon de la lando kaj de ĝiaj enloĝantoj. La stilo estas agrabla, la enhavo interesa kaj eduka, kaj enestas malmultaj neologismoj. La bildoj estas ĉiuj klarvideble kaj simple “pentritaj” kaj ofte aspektas moralaj kaj instruaj. Ili vestiĝis antikvece por klare montri la historian paŝadon el la antikva Makedonio ĝis la nuna.

[Marcel Leereveld] ☐

**Geraldo Mattos:** *Apartaj mondoj: verboj kaj participoj.* Chapecó-SC (Brazilo): Fonto, 1999. (Dua eldono.) 88p., broŝ. Takso: 🍷🍷🍷🍷.

Dum la 1960'oj okazis viglega disputo kiu minacis disŝiri la Esperantomovadon, pri temo tiam de pli ol 70 jaroj aktuala: la signifo kaj uzmaniero de la pasivaj participoj *-ata* kaj *-ita*. (Interese, kaj atentinde, ke pri la substantivaj kaj adverbiaj formoj *-ato/-ate, -itol/-ite* preskaŭ tute mankis disputado!)

Mattos argumentas ke ĉe la fundamento de la disputo estis simpla miskompreno: ke la disputantoj supozis ke temas pri *verbformoj*, kvankam laŭ la Esperanta gramatiko *-ata* kaj *-ita* estas *adjektivoj*, **neniel** verbaĵoj. Misprezento jam en la fruaj instru-libroj estis partkaŭzo de tiu miskompreno. Oni ankaŭ erare supozis ke Zamenhof ial celis kaŝe konduki verbformojn respondantajn al la perfekte, imperfekte, pluskvamperfekte, kc.kc.kc. de diversaj naciaj lingvoj, kion li efektive tute ne celis.

Misprezento de simplaj lingvismaj faktoj, fare de ambaŭ partioj (la “atista” kaj la “it-ista”) pliardigis la dis-

puton, kaj kondukis al anatemado ambaŭflanke.

Mattos tre klare, konvinke, kaj per multaj ekzemploj prezentas la esencon de la disputo, kaj ankaŭ la solvon kiun adoptis la Akademio sed kiun ankoraŭ miskomprenas la plejparto de Esperantistaj verkantoj.

Por lingvisme kleraj legantoj, tre grava kaj studinda libro.

[Donald Broadribb] □

**Miroslav Malovec:** *Gramatiko de Esperanto*. “Dua eldono plilarĝigita”: Dobřichovice (Prago): Kava-Pech, 2000. 135p., broŝ. **Takso:** ☹☹.

Ĝenerale, konciza esprimo de vidpunktoj similaj al la vidpunktoj en *Plena Analiza Gramatiko*. T.e., tre konservativisma prezento de gramatikaj temoj, uzanta la terminologion kaj aranĝon grek-latinajn popularajn dum la 19a kaj frua parto de la 20a jarcentoj. Kiu do familiaras kun “subjunkcio, modaj helpvortoj, volitivo, lokaj adjektoj, tempaj adjektoj, stataj adjektoj, modalaj adjektoj” kc.kc.kc., kaj emas distingi inter “verboj de daŭro sen rezulto, verboj de rezulto sen daŭro, verboj de daŭro kun rezulto, verboj hibridaj”, aŭ “voĉoj aktiva, pasiva, mediala” sendube ĝuos la verkon; aliaj personoj eble trovos la sennombrajn distingojn sencelaj, senutilaj, kaj ofte erarigaj.

Kontraste al Geraldo Mattos, Malovec plu konsideras la participojn kiel verboformojn...


Aliflanke, la diskuto pri la origino kaj naturo de la ATA/ITA-problemo estas majstra, kaj prezentas la miskomprenojn kiuj abundis ĉe ambaŭ skoloj. La neatendita sed konvinke pruvita deklaro de Malovec estas: Ambaŭ skoloj pravis! Se vi ne kredas, do legu lian diskuton senpartian kaj sen-

antaŭjuĝan.

Ke la dua eldono estas efektive “**plilarĝigita**” mi vere profunde dubas, ĉar la paĝoj estas relative negrandformataj. Verŝajne la eldono celis diri “dua eldono pli-**grandigita**”.

Mi mem multe preferas uzi la *PMEG*-on de Wennergren, kiu estas lingvisme aktuala, fidinda, refreŝige senjargona, kaj ne strebas trudŝovi Esperanton en la rigidajn vitrajn ŝuojn de la grek-latinaj gramatikaj kategorioj. Problemo por ne-Retuzantoj tamen estas ke la *PMEG* haveblas nur per la Interreto, ĉe <<http://purl.oclc.org/NET/pmeg>>

Donald Broadribb □



JapEnglish sign at the Golden Gate Bridge gift shop (San Francisco, California)

[from esperanto usa 1/2000]



## Deziras Korespondi



• '05/01/2000  
SVETISLAV SLAVCHEV, Mladost b.l.124  
entr.7 apt.131, 9030 Varna, Bulgario:  
Mi estas 47-jaraĝa Esperantisto de la  
urbo Varna en Bulgario. Mi estas ins-  
truisto de la Angla lingvo en mez-  
lernejo. Mia edzino Diana estas  
kuracistino nuntempe laboranta en  
Ateno, Grekio. Ni havas filinon Roxa-  
na, 12-jaran.

Nia familio deziras korespondi kun  
geesperantistoj en Novzelando. Ni  
kun granda plezuro renkontiĝus kun  
gesamideanoj el Novezelando dum la  
Kongreso en Tel-Avivo, aŭ, en la mal-  
proksima futuro, en Bulgario aŭ Nov-  
Zelando.

Ni interesiĝas pri diversaj temoj,  
kaj ni estas pretaj respondi al kiaj ajn  
demandoj. Mia edzino parolas iomete  
Esperanton kaj la Anglan lingvon.  
Nia filino parolas bone la Anglan  
Lingvon. Mi parolas la Anglan, Ital-  
an, kaj Rusan lingvojn; mia edzino  
parolas bone ankaŭ la Grekan lin-  
gvon.



La familio Slavchev

Nuntempe en Bulgario estas vin-  
tro. Ĉie en Bulgario neĝas, sed unike

ĉe la Bordo de la Nigra Maro la neĝo  
kutime degelas la saman tagon. Ho-  
diaŭ ĉi tie la temperaturo estas +3°C,  
sed en la interna parto de la lando la  
temperaturo estas 5 ĝis 9 gradojn  
malpli alta. Sed dum la somero Varna  
estas la plej alloga urbo de Bulgario,  
do ni invitas gastojn el Novzelando.

• ANIA CZERNY, ul. Piaskowa 4, 67-  
115 Nytom Odrzański, Pollando: Mi  
havas 21 jarojn, kaj mi estas student-  
ino. Mi lernas en Medicina Akademio.

Mi deziras plibonigi mian Espe-  
ranto-lingvoscion, ĉar normale mi ne  
havas okazojn por paroli Esperan-  
ton. Por mi estus ege granda plezuro  
korespondi kun aliaj geesperantistoj.

Min interesas la biologio, kemio.  
Mi ankaŭ lernas la Anglan kaj Ger-  
manan lingvojn. Tre volonte mi aŭdas  
diversajn muzikojn, kaj mi multe da  
tempo pasigas en la montaroj. Mi ege  
ŝatas trairi la montarojn, turisme.

• M. MEHDI NORUZI, Box 838, Neshat  
st., Esfahan 81465 Irano — e-poŝte:  
[mhdnoruzi@yahoo.com](mailto:mhdnoruzi@yahoo.com): Irana Espe-  
rantoklubestro, 30-jarulo, serĉas  
gekorespondemulojn por geklubanoj  
17- ĝis 37-jaraj, pri ĉiuj temoj. Li an-  
kaŭ serĉas s-aninon por geedziĝo.

• ALEXANDRE MAUMONT, 14 Aux Plan-  
tes de Vidal Bas, 33220 Saint-Andre  
et Apelles, Francio: 10-jara knabo,  
loĝas en Francio. Li volas korespondi  
kun iu pli aĝa ol li mem, eĉ plen-  
kreskulo. Alexandre ŝatas sportojn,  
hundojn kaj amikojn. Lia letero estas  
havabla de la korespondservistino,  
Penny Vos; nur petu! □

## NIA BILDARO

el la Somerlernejo en Sidnejo en januaro ĉijara



Bernie Heinze kaj Marcel Leereveld aktoras en *La naŭ veraĵoj*



Prof. Daniel Kane de la Universitato Macquarie en Sidnejo





Dennis Murphy kun S-ro Lee  
kaj la Koreaj vizitantoj



Lee Jung-Kee, nia Korea gast-instruisto

## SUKCESIS EN LA EKZAMENOJ

**Elementa:** Joy Turvey (NSW)

**Baza:**

Maria-Claudia Faverio (NSW)  
 Anthony Gaskell (NSW)  
 Barbara Gates (NSW)  
 Maureen Grados (NSW)  
 Henriette Vanechop (NSW)

**Meza:**

Edna Watson (NSW)  
 Sid Wolifson (NSW)

**Alta:** Edna Turvey (NSW)

**Korekto:** *Ken Rolls sukcesis en la Supera ekzameno kun honoro. [Miskraportite de via redaktoro en nia marto-aprila numero.]*

### KOMUNIKO DE LA KOMISIITO POR EKZAMENOJ:

Ĝis nun oni povis trapasi la bazan kaj la mezan Ekzamenojn nur en Melbourne, Adelajdo, kaj en Somerkursoj. Sed nun ekzamenistoj estas elektitaj por ĉiuj neokcidentaj ŝtatoj de Aŭstralio, tiel ke oni povos ekzamenati en kvin ĉefurboj.

Se vi interesiĝas pri la baza aŭ la meza Ekzameno, skribu al unu el la ĉisekvaj ekzamenistoj, kiu sendos al vi (senpage) la respektivan 400- aŭ 1000-vortliston necesan por tiuj ekzamenoj, kaj kiu aranĝos kun vi daton kaj lokon por la ekzameno:

**NSW:** Edna Turvey, 36 Calder Rd, Darlington 2008;

**Qld:** Hazel Green, 44 Toowoomba Rd, Oakey 4401;

**SA:** Bob Felby, 6 Dorset St, Semaphore Park 5019;

**Tas:** Dudley Parkinson, 68 Risdon Rd, Newtown 7008;

**Vic:** Ken Rolls, 31 Miller Cresc.,

Mt Waverley 3149.

Utilaj por kandidatoj estos la aĉeto (ĉe la Libro-Servo) kaj studo de:

1) *Studlibro por la Baza kaj la Elementa ekzamenoj* (por la Baza kaj Meza);

2) *Guide for First Examinations* (por la Baza), aŭ *Gvidilo por la ses ekzamenoj de AEA* (por la Meza). □

## NEKROLOGO

NANCY COWLING-LAWSON

Ni eksciis nur ĵuse ke en junio 1999 mortis Nancy Cowling-Lawson. Nancy estis la edzino de unu el la plej bonaj kaj konataj Esperantistoj en la mezo de la 20a jarcento: Pastro Cedric C. Cowling, tiutempe loĝanta en Tasmanio. Pastro Cowling mortis antaŭ multaj jaroj. Pro lia Esperanta aktiveco la edzinon preterpasis konateco, ĉar ŝi ĉiam modeste restis en la nereliefeco, sed, estante mem sperta Esperantistino, ŝi multe helpis la edzon en lia tia laboro.

Post la morto de la edzo, Nancy ne plu okupiĝis pri Esperanto, sed ankaŭ iliaj du filinoj, Anne kaj Susan, lernis Esperanton kaj posedas la Bazan Diplomon.

Ni kondolencas, malfrue, al la samfamilianoj.

Marcel Leereveld □

## MI NE DORMIS!

de JAMES REZENDE PITON

La dek plej bonaj pravigoj por uzo kiam oni surprizas vin dormanta dum laborkunsido:

- 1) "En la sango-banko oni diris al mi ke tio povus okazi..."
- 2) "Tio estas minuta paŭzo por restarigo de energio, kiel oni ins-

- truis en tiu kurso pri tempo-regado, kiun vi pagis por mi...”
- 3) “Mi bildigis al mi kia estas la vivo de blindulo...”
  - 4) “Mi ne dormis! Mi meditadis pri la misio de nia entrepreno kaj mi provis trovi novan paradigmon...”
  - 5) “Ja mi nepre devas iri al okul-kuracisto, kiel eble plej baldaŭ...”
  - 6) “Mi estis en tre specifa joga ekzerco por forigo de streĉo en nia laboro. Ĉu vi diskriminacias kontraŭ jogo-praktikantoj?”
  - 7) “Kial vi interrompis mian cerbumadon?! Fi! Mi estis proksima al la solvo de nia plej grava problemo...”
  - 8) “La kafomaŝino paneis...”
  - 9) “Kiu miksis la poton de senkafeina kafo?”

Sed inter ĉiuj, se oni trafos vin, la plej brila solvo estas:

- 10) “...je la nomo de l’Patro, de l’Filo kaj de l’Sankta Spirito. Amen.”  
[<james@lnls.br>](mailto:james@lnls.br)  
 [El la diskutlisto *Veki*]

---

## RETADRESOJ

### Korekto:

Jenny Bishop:

[Esperanto@education.monash.edu.au](mailto:Esperanto@education.monash.edu.au)

### Novaj:

Ken Rolls: [kenrolls@hotmail.com](mailto:kenrolls@hotmail.com)

Donald Broadribb:

[donaldbroadribb@mac.com](mailto:donaldbroadribb@mac.com)

---

## UEA MEMBRO-STATISTIKO 1999

### Individuaj membroj:

En 20 landoj estis pli ol po 100 individuaj membroj: Francio (686),

Germanio (587), Brazilo (552), Japanio (409), Usono (389), Nederlando (349), Svedio (255), Italio (253), Finnlando (234), Britio (230), Hispanio (190), Ĉinio (187), Belgio (185), Ruslando (170), Pollando (150), Svislando (134), Hungario (122), Kroatio (109), Danio (108) kaj Ĉeĥio (102).

### Aligitaj membroj:

Aligitaj membroj estas tiuj membroj de la aliĝintaj landaj asocioj, kiuj ne estas individuaj membroj de UEA. Pli ol 200 aligitajn membrojn nombris Germanio (1079), Japanio (1062), Ĉinio (963), Italio (895), Svedio (686), Britio (510), Belgio (504), Usono (429), Pollando (330), Hispanio (329), Nederlando (293), Norvegio (292), Greklando (271), Portugalio (268), Brazilo (265), Hungario (232), Finnlando (213), Kroatio (210) kaj Slovakio (207). □

---

## LA VOJAĜSTIPENDIO MEMORE AL TIM EINIHOVICI

Junaj esperantistoj 18-29-jaraĝaj estas invitataj peti kandidatigon por esti elektotaj por la ĉijara stipendio de la Fonduso Tim kaj Idyss Einihovici. La stipendio pagos la ir- kaj reven-vojaĝon al Hongkongo kun restadkosto por utile partopreni en la ĉijara Internacia Junulara Kongreso 5-12 de aŭgusto. La kandidatoj devos subiĝi al la Elementa Ekzameno de AEA kaj sukcesi kun Honoro. (Ĉirilate la Komitato decidis surbaze de ekzamenrezultoj).

Registriĝpeton adresu al la kasisto de AEA:

Margaret Inglis, 4 Mayfield Drive, Mt Waverley, Vic. 3149, Aŭstralio . □

## KOLEKTO 2000 – PLENUMITA MISIO

Kiam en 1998 estis lanĉita la projekto Kolekto 2000, neniu esperis atingi tiom da sukceso.

Kolekto 2000 meritas sian nomon ĉar ĝi finkompletiĝis komence de la Eŭropa printempo de la 2000-a jaro! Ĉi tiuj vortoj anoncas la aperon de la du lastaj kodiskoj [kompakt-diskoj], fermante tiel Kolekton 2000. Ambaŭ diskoj prezentas bandojn tute novajn, neniam eldonitaj en Esperantio.

La 9-a kodisko de la kolekto, *Kia viv'* enhavas 7 titolojn de la Franca varietea rok-gruva bando el Nantes. Ĝia kantisto, Kris Spitzer, Esperantistiĝis antaŭ pli ol unu jaro. La tekstoj prezentas ekstremajn ĉiutagajn vivproblemojn, ekzemple:

Aidoso, frenezo, danĝera stirado, morto, amo, surstrata vivo, pasio, disiĝoj, ktp...

La 10-a, lasta, kodisko, *Lingvo Intermonda* entenas 9 titolojn de la Finna-Brita ummuzika bando Dolĉamar el Helsinki. Vi malkovros muzikojn umantajn inter repo kaj hip-hopo kaj ekstertera tekno-roko. Miriga kosmoŝipa vojaĝo tra la tero per intermonda lingvo: buklu viajn

savzonojn kaj bonfortunan vojaĝon... Ĉu vi pretas por iro al Dolĉamar?

Kun la antaŭe aperintaj kodiskoj — ĉiuj abunde disponeblas — la tuta kompleta kolekto donas ne nur preskaŭ 5 horojn da diverstila nuna Esperanta muziko sed ankaŭ ĉe la randoj de la kunigitaj kodiskoj estas belaspektaj grafikaĵoj kiuj resumas la kolekto-koncepton por la plej granda ĝojo de postulemaj kolektistoj.

De la unua ĝis la oka kodisko, Kolekto 2000 estas: 1. *JoMo kaj Liberecanoj*; 2. *Jacques Yvart Kantas Georges Brassens*; 3. *Persone ...sed estas ne.*; 4. *Solotronik Polimorfia Arkitektnia*; 5. *Merlin Por la Mondo*; 6. *La Porkoj Ŝako*; 7. *Kajto Masko*; 8. *La Kompanoj Survoje*.

Ĉiuj kodiskoj disponeblas ĉe la kutimaj libroservoj aŭ rekte ĉe Vinilkosmo, po €12.05 + sendokostoj.

La tuta Kolekto 2000 (10 kodiskoj duondaŭraj, po maks. 29 min.) kostas €99.10 + sendokostoj.

Vinilkosmo: FR-31450 Donneville, Francio.

Rete: <[vinilkosmo@esperanto.org](mailto:vinilkosmo@esperanto.org)> □



# HONESTA KNABINETO

Rakonto el *El Popola Ĉinio*

Ilustraĵo de John Gallagher



Artverko de John Gallagher  
Fotis Kam Lee

Mia amikino petis aĉeti akvomelonon por ŝia naskiĝtaga kunveno en vespero. Tagmeze, preterpasante akvomelonan bazon, mi venis al stando, knabineto de la stando diris al mi: “Onklino, bonvolu iom atendi, se vi volus aĉeti akvomelonon. Mia patro hejmeniris por tagmanĝi, sed baldaŭ revenos.” Efective mi ne scipovis elekti melonon, sed tiam mi frapetis tiun kaj alian, ŝajnigante min sperta. Mi demandis: “Ĉu viaj akvomelonoj estas dolĉaj?” Dirinte, mi tuj sentis la demandon superflua. Kiu florumvendisto ne laŭdas ke liaj floroj estas plej bonodoraj? Sed ekster mia atendo, la knabineto respondis: “Ĵus mi manĝis pecon da melono, kaj tiu estas ne sufiĉe dolĉa.” Estis por mi la unua fojo ke mi aŭdis tian vorton de vendanto de akvomelono. Mi tre admiris la

honestecon de la knabino. Timante mokon de mia amikino pri mia senkapableco, mi foriris sen aĉeto, kvankam mi tre volus aĉeti ĉe ŝi akvomelonon.

Ĉe alia akvomelona stando staris el inter amaso de akvomelonoj tabulo sur kiu estis skribo: “Ĉi tie akvomelonoj la plej bonaj en la urbo!” Mi min enpuŝis en la homamason por elekti. Ĝuste tiam post mia dorso leviĝis insulto “Sentaŭgulino! Kial vi diris, ke la melonoj estas nedolĉaj? Kial vi tiel diris?”

Turnite min pro scivolemo, mi trovis ke mezaĝa viro batas la knabinon per pesilvekteto. Mi mallaŭte demandis apudan avinon, kiu vendis liĉiojn, kaj ŝi diris: “La patro koleras pro ŝia ligna kapo en negoco. Verŝajne la knabino meritas. Kiam oni elektis ŝiajn melonojn, ŝi diris ke ŝiaj akvomelonoj ne estas sufiĉe dolĉaj, kaj tiele ŝi fortimigis la aĉetantojn.” Ve, ĉu estas kulpo diri la veron?

Mi pensis ke se la knabino trompus min, mi certe aĉetus ŝian melonon, sed kiam ŝi diris la veron? Ĉu tio ne estas “premio al mensogulo kaj puno al honestulo”? Mi sentis konsciencoproponon.


Puŝante per ioma forto, mi kuris al la knabino kiel eble plej rapide. “Knabineto, mi aĉetu vian akvomelonon!” Mi prenis la plej grandan melonon kaj ĝin metis sur la pesilteleron. La viro postulis ke mi pagu: “Ses juanoj kaj du jiao-oj.”

Sed mi donis la monon ne al li, sed al la knabino: “La ekstraj ok jiao-oj estas kiel premio por vi.”

Fakte, pro ŝi mi aĉetis la akvomelonojn, precize pro ŝia honesteco.

Vespere, la granda akvomelono estis tranĉita sub la brilaj kandeloj. La nematura pulpo tuj vekis mallaŭdon de la amikoj. Gustuminte, preskaŭ ĉiuj diris ke la melono estas nedolĉa. Mi rakontis al ĉiuj pri la knabino, kaj iuj laŭdis min, dum aliaj ne. Kompreneble, estis domaĝe pagi sep juanojn por nedolĉa melono, sed estis inde por kuraĝigi knabinon diri veron. Honesteco ne havas prezon, kiom da mono egalas al vero? Mi ne povas imagi al mi. Eble vi ne povas akiri honestan vorton kontraŭ mil aŭ dek mil juanoj. Mi emociiĝis pro ŝia honesteco.

[El *El Popola Ĉinio* 5, 1992.] □



Poloa Golfŭdo

Bill Thorne

## AŬSTRALIA SEKCIO DE ILEI JARRAPORTO 1999

La plej grava evento, Aŭstralia Esperanto-Somerkursaro, okazis januare kaj allogis por dusemajna restado pli ol 80 aliĝintojn el sep landoj. Instruis

Atilio Orellana Rojas de Internacia Esperanto Instituto, Marcel Leereveld, Franciska Toubale, kaj (Jaŭ) Frimpong Badu. Boi Ngoc Hoang vizitis por varbi partoprenantojn al la 2a Azia Kongreso en Hanojo.

Sukcesis en la ekzamenoj de la AEA-ekzamenkomitato — je la baza nivelo: 6; je la elementa nivelo: 2; je la meza nivelo: 9; je la supera nivelo: 1, kaj je la alta nivelo: 2.

Krom dumjaraj kursoj en la 13 diversaj kluboj kaj grupoj, aktivas la Korespondkurso Servo de AEA. 7 homoj aĉetis 9 korespondkursojn.

Plejparte informpetoj venis perrete kaj kelkaj lernantoj utiligas la kurson de Ian Fantom, ĉe [www.esperanto.org/espviva](http://www.esperanto.org/espviva).

Interretkurso senpaga, enkondukita de la Esperanto-Societo de Suda Aŭstralio, ĉe [www.ozemail.com.au/~esperanto](http://www.ozemail.com.au/~esperanto) allogis dek homojn el ses landoj, inter kiuj tri finis la dek lecionojn.

Nova vidbenda kurso estis haste preparita por montrado unue per komunuma televidkanalo en Okcidenta Aŭstralio. Pri ties rezulto raporto aperos.

Instruado ankaŭ al grupoj da infanoj troviĝas ĉe la Universitato de Suda Kvinslando kaj en Montessori-lernejo en Nova Sudkimrio.

Tiel montriĝas ke kvankam ne grandnombre, instruistoj tre ruze serĉas la plej efikajn manierojn proponi lecionojn de Esperanto en Aŭstralio.

Por informi pri Esperanto la asocion de lingvinstruistoj de Viktorio, la Melburna Esperanto-Societo pagis por munti buntan ekspozicion en la Kongreso de Lingvinstruistoj. Krom ricevi informon kaj rigardi diversajn librojn, eblis ankaŭ rigardi la bonajn

vidbendajn kursojn: *Mazi en Gondolando kaj Esperanto – Pasporto al la tuta mondo.*

Interese ke instruistoj petis informon por siaj propraj infanoj, “kiuj ofte demandas pri Esperanto”!

Sekciestro Jennifer Bishop □

## ĈU VI JAM AŬDIS ĜIN?

Jen anekdotoj prenitaj laŭvorte el *Lingvo Internacia*, jarkolektoj 1896 ĝis 1899. Legu kion la praesperantistoj opiniis amuza:

### *Interparolo subaŭskultita*

“Ĉu Vi estas esperantisto?”

“Jes!”

“Hm... Domaĝe...”

“Sed Vi ja ne estas esperantisto?”

“Mi?!...”

“Jes, Vi.”

“Neniam!...”

“Dankon al Dio.

### *Malfeliĉaj infanoj*

Antaŭ kelka tempo sin trovis en ia gazeto sekvanta anonco: “Oni serĉas servantinon, kiu povas kuiri kaj vesti infanojn”.

Malfeliĉaj infanoj!

### *Profunda distreco*

Sinjoro (al la poŝoŝtelisto, kiun li ekkaptis je surtuta kolumo):

“Mi kaptis vin, rabisto, ĉe la ŝtelado mem. Kion, diablo, vi serĉis en mia poŝo?”

Ŝtelisto: “Pardonu, bona sinjoro; mi estas tiel ofte en profunda distreco! Mi havis antaŭ malmulta tempo surtuton, kiu tute similas la vian, kaj mi pro eraro kredis, ke ĝi estas la mia.”

### *Bone rebatite*

Konata verkisto ekkriis unutage “hm!” post amiko, kiun li vidis malproksime sur la strato. Dando, kiu tion ĉi aŭdis, ofendita sin turnis kaj ekvokis kun la manoj sur siaj flankoj: “Kiel vi povas riski krii ‘hm!’, kiam mi iras en la strato?” La verkisto, imitante la gestojn de l’dando, kriis per tia sama malafabla tono: “Kaj kiel vi povas riski iri en la strato, kiam mi krias ‘hm?’”

### *Interesa legendo*

La sekvanta kunparolo, laŭrakonte, ekzistis inter Angla vojaĝanto kaj ia maristo trovante sin sur amerika vaporŝipo:

“Tio estas ja Black Mountain?”

“Jes, sinjoro; la plej alta monto, kiu ekzistas ĉe Lake George.”

“Ĉu oni havas ian historion aŭ legendon pri tiu ĉi monto?”

“Jes, oni rakontas, ke amanta paro unufoje surrampis de tiu ĉi flanko sur la pinton de l’monto, sed neniam returnis.”

“Ĉu efektive! Nu, kio do fariĝis el ili?”

“Ili iris malsupren sur la alia flanko.”

### *Alesto de konscio*

[Al] scienculo okazigis unufoje en tia dispensemeco trinki grandan glut-aĵon da inko el sia inkujo. Feliĉe li havis tamen sufiĉe da konscio por tuj engluti du foliojn da inksorbilo.

### *Konfido*

“Avino, ĉu vi havas fortajn dentojn?”

“Ne, mia malgranda amiko, bedaŭrinde mi ne havas eĉ unu denton.”

“Estas bone. Volu do kaŝi miajn nuksojn, ĝis mi revenos.”

### Logike

“Patro, ĉu l'instruisto povas min puni por io, kion mi ne faris?”

“Certe ne, mia filo!”

“Nu, mi ne devas fari mian lecionon.”

Patro: “Diru, Karlo, ĉu vi havas multajn amikojn en la lernejo?”

Karlo: “Ne, neniu.”

Patro: “Nu, kial?”

Karlo: “Jen, vidas vi, la knabojn, kiuj min batas, mi ne povas toleri, kaj tiuj, kiujn mi batas, min ne povas toleri.”

### Mark Twain

Mark Twain unufoje volis “ilustracii” publikan paroladon, kiun li faris pri la Sandŭiĉ insuloj. Parolante pri la tiea antikva moro manĝi homojn, li proponis nome montri, kiamaniere tio fariĝis “se iu el la sinjorinoj alestantaj volis prunti al li infaneton dum kelkaj momentoj”.

### “Granda fajrego

aperis dum la lasta nokto en la X-a strato. Dektri homoj kaj unu tajloro enbrulis.”

### Maldelikate

Juna virino ravanta: “Ah, sinjoro profesoro, kion dirus tiu ĉi maljuna kverko, se ĝi povus paroli.”

“Ĝi dirus: “Pardonu, mia estimata sinjorino, mi estas tilio.”

“Ĉu vi havas ankoraŭ ĉiujn dentojn, mia sinjorino?”

“Kial vi demandas tiel strange, mia sinjoro?”

“Ĉar mi ne povas kompreni, kiel en tiel malgranda buŝo 32 dentoj trovas lokon.”

### Malkonsento

Sinjorino Y. skribas leteron al sia amikino. Dum la skribado ŝi rimarkas, ke Evelin legas la leteron post ŝia dorso. Ŝi daŭrigas skribante:

“Mi volus al vi skribi ankaŭ sekreton, sed mi nun ne povas, ĉar Evelin staras malantaŭ mi kaj legas mian leteron.”

Evelin kolere diras: “Tio ĉi ne estas vera; mi ne legas vian skribaĵon.”

### Nekredebla

“... Dum teruriga tondrado, la tondro subite falis en mian ĉambron kaj cindrigis mian fratinton...”

“Kaj kion vi faris?”

“Mi sonorigis al la ĉambristino kaj diris al ŝi: “Heleno, elbalau la fraŭlino.”

### Friponaĵo

Studento eniras en drinkejon, kie li ekvidas sian kreditoron, tajloron.

“Estas vera friponaĵo tio, kion vi faras.”

“Kial do?” demandas la tajloro terure.

“Vi manĝas tie ĉi kokinan viandon kaj salaton, vi trinkas bonegan vinon por tiuj ĉi vi havas monon!... sed vi tamen ĉiutage persekutas min pro la dek markoj, kiujn mi ŝuldas al vi.”

### La estinteco

“Ĉu vi efektive ne edziĝos je fraŭlino Terezio? Ŝi estas ja riĉa, kaj ankaŭ ne malbela.”

“Sed ŝia estinteco...”

“Mi certigas vin, ke ŝia estinteco estas senmakula kaj pura.”

“Ho amiko, tion ĉi mi kredas; sed ĝi estas tre longa...”



## KIO KAJ KIU

de Marcel Leereveld

1. Kio estas tio? — Tio estas donaco al ci.
2. Kio estas li? — Li estas la celtenulo (ĉe pilkludo).
3. Kio estas tiu? — Tiu estas la malantaŭulo.
4. Kio estas ŝi? — Ŝi estas maŝinlaboristo.
5. Kio estas tiu ĉi? — Ŝi estas la subĉefo.
6. *Kiu* estas li? — Li estas Johano Johnson
7. *Kiu* estas tiu? — Tiu estas mia frato.
8. *Kiuj* estas ili? — Ili estas miaj fratinoj.
9. *Kiuj* estas tiuj? — Tiuj estas miaj nepinoj.
10. Kio estas li? — Li estas plumbisto.
11. *Kiu* estas tio? — Tiu estas nova membro.
12. *Kiu* estas tiu? — Tiu estas mia frato.
13. Kio estas lia nomo? — Li nomiĝas Henriko.
14. *Kiu* el tiuj nomoj estas lia? — Tiu estas lia nomo.
15. Ĉu li nomiĝas Henriko? — Jes, tio estas lia nomo.
16. *Kiun* nomon el la tri ci preferas — Mi preferas tiun (el la tri).
17. Kio estas ŝi? — Tio estas la reĝino de Britio.
18. *Kiu* estas ŝi? — Tiu estas reĝino Viktorino.
19. *Kiu* staru en la mezo? — Tiu staru en la mezo.
20. Kio estas tiu en la mezo? — Tiu estas la kapitanino.
21. Kio estas tiu libro? — Ĝi estas vortaro.
22. *Kiun* el la libroj ci aĉetos? — Mi aĉetos tiun (libron).
23. Sur kio ci sidas? — Mi sidas sur kuseno.
24. Kun *kiu* ci manĝis? — Mi manĝis kun miaj gepatroj.
25. Por kio li studas? — Li studas por esti teĥnikisto.
26. Kiel kio ci laboras? — Mi laboras kiel bankisto.
27. Kiel kio ci ludos? — Mi ludos kiel celtenisto.
28. Kiel *kiu* ĝi aspektas? — Ĝi aspektas kiel ĝia patro.
29. Kiel *kiu* ŝi aktoras? — Ŝi aktoras kiel Reĝino Viktorino.
30. Jen novveninto; kio estas ŝi? — Ŝi estas la kuiristino.
31. Jen kvar virinoj; *kiu* estas cia patrino? — Tiu ŝi estas.
32. *Kiu* estas tio? — Tiu estas mia fratino.
33. Kion li faras? — Li faras kadrojn.
34. Kio li estas? — Li estas kadrofaristo.
35. Kio estas lia nomo? — Lia nomo estas Johano.
36. *Kiu* li estas? — Li estas Johano Peters.
37. Kio ŝi volas fariĝi? — Ŝi volas fariĝi flegistino.
38. Kio ŝi estas? — Ŝi estas fraŭlino.
39. *Kiu* ŝi estas? Ŝi estas fraŭlino Johnson.
40. *Kiu* ŝi volas fariĝi? — Ŝi volas fariĝi Sinjorino Peters.

# KELKAJ KONSILOJ POR PLIBONIGI STILON

de Valentin Melnikov

Se vi anstataŭigas substantivon per pronomo, do uzu lin korekte.

Ne forgesu akuzativo kaj uzu ĝi ĉie kie necesas.

Tamen superfluan akuzativon ne aperu en viajn verkojn.

Ne trouzu je la prepozicio “je”, ĉar se vi kulpos je tio, oni taksos vin je malbona Esperantisto.

La sama rimarkumo rilatas al la sufikso “um” se vi, vortumante vian cerbumaĵon, ne povumas trovi pli tutan solvumon, vi estas fuŝumisto!

Nekompletaj frazoj — malbone!

Uzu nur simplajn kaj klarajn frazojn ĉar se vi estus uzanta komplikajn konstruaĵojn vi povus esti forgesanta pri kio vi devus esti rakontonta kaj la legontoj estus perdantaj la tutan intereson pri vi.

Kio koncernas nefinitajn frazojn.

Nekonvencia metaforo similas abomenan bufon kiu per siaj nigraj flugiloj ŝirmas lumon de la kristale pura fonto, do indas ĝin elsarki!

Malgranda rimarko pri ripetadoj kiuj fojfoje aperas en verkoj versaj kaj prozaj, kiuj estas publikigataj en gazetoj kaj libroj kiuj estas eldonataj ĉe ni kaj eksterlande, kiuj sufiĉe malklarigas la penson kiun volis eldiri la aŭtoroj pri kiuj ni volis fari tiun ĉi rimarkon.

Laŭ nia profunda konvinko, ni opinias ke la aŭtoro, kiam li skribas sian propran verkon, tutcerte ne agu laŭ tre malbona kutimo kies esenco

estas en tio ke oni uzas tro multe da nebezonataj kaj superflujaj vortoj kiuj reale tute ne estas necesaj por esprimi la penson de la aŭtoro.

Ne elpensu tro longajn vortojn, vi povas embarasegiĝi se ili estos neklareparoleblaj kaj miskomprenigantaj.

Se via verko estos hiperplena de redundaj neologismoj, ĝi aspektos turpe kaj hide, kaj oni etikedos ĝin mava.


Malbone sciante la gramatikon, komplikaj frazoj estos uzataj sin-garde!

Superflujaj pronomoj, ili ne estas bezonataj.

Mallerteco de uzado de la prepozicio “de” povas esti kaŭzo de malapero de intereso de legantoj de via verko.

S-anoj, bv. ne mllg.

Pri la ordo de vortoj zorgu nepre, ĉar la en Esperanto libera, rusan lingvon simile, de la vortoj ordo, el la neceso sian penson klare esprimi, ne liberigas.



[Origine en *La Ondo de Esperanto*.  
Represita el *Antaŭen*, Jan. 2000]

## DIVERSAĴOJ

• **KD-fakvortara:** *MultiDisc*, KD-ROMo por Windows 95, ehhavas pli ol 50 fakvortarojn Francajn-Esperanto-Francajn. Temas pri agrikulturo, anatomio, antaŭnomoj, arkitekturo, konstruado, arkeologio, artoj, astronomio, aviado, botaniko, ĉasado, fervojoj, kemio, kuirado, ekonomiko, elektro-elektroniko, entomologio, familiaraj vortoj, figuraj vortoj, foto-grafio-optiko-kino, geografio, geologio, gramatiko, heraldiko, historio, iktiologio, iloj-maŝinoj, komputiko, juro, landoj-loĝantoj-lingvoj, likvaĵoj, literaturo, maro, matematiko, medicino, meteologio, milito, mineralologio, mitologio, muziko, ornitologio, propraj nomoj, profesioj, proverboj, religioj, sportoj-ludoj, tekniko, telekomunikoj, televido-radio, titoloj, vehikloj, vestaĵoj, zoologio.

*Informas Christian Bertin,  
La Benairie, Route de Servon,  
FR-35410 Chateaugiron, Francio.*  
[Laŭ *Heroldo de Esperanto* 30 jan. 2000]

• **Fervoja Vortaro:** Ĵus aperis Ĉina-Esperanto-Angla vortaro enhavanta 15 000 Ĉinajn, 17 700 Esperantajn kaj 18 000 Anglajn fervojajn terminojn. La terminoj estas listigitaj laŭ la Ĉina lingvo kaj ekzistas ankaŭ indeksoj Esperanta kaj Angla.

La vortaro estas 620-paĝa kaj kostas US\$10 inkluzive la sendokoston.

Adreso: [gao@public.hh.nm.cn](mailto:gao@public.hh.nm.cn)

[Laŭ *Heroldo de Esperanto* 30 jan. 2000]

• **Radikaro de Esperanto:** Ĉeĥa Esperantisto, Miroslav Malovec (ĉe la adreso [starto@clavis.cz](mailto:starto@clavis.cz)) publikigis per la Interreto kompletan liston de la radikoj en la Esperanta vortprovizo — ne nur ĉiujn de *PIV* sed ankaŭ multajn aliajn. Plejparte la listo estas sen difinoj, kvankam por pluraj

radikoj (kaj multaj mallongigoj) estas utilaj komentoj. La listo celas esti utiligata de vortaristoj kaj aliaj lingvoprilaboristoj Esperantaj.

• **Artikoloj aperintaj en *Monato*** estas legeblaj nun per la Reto, ĉe <http://monato.esperanto.be>. Ni forte rekomendas ĉi tiun arkivon, en kiu oni trovas recenzojn pri dekoj da libroj, kaj artikolojn pri ĉiaj temoj.

• Komika bildstrio en Esperanto nun aperas per la Reto. Ĝi estas preparata de Aaron Reed, kaj legeblas ĉe <http://www.geocities.com/tamakajghama/>. La unua strio (legita fine de marto) estis bone desegnita, sprita, ĝuiga. Via redaktoro rekomendas ĝin. La aŭtoro de la bildostrio estas kontakt-ebla ĉe [Aaronibus3@aol.com](mailto:Aaronibus3@aol.com).

• **Retadreso de Estraro de NZEA:**

Bradley McDonald [neelam@voyager.co.nz](mailto:neelam@voyager.co.nz) Prezidanto de NZEA

Dave Dewar [gddewar@ihug.co.nz](mailto:gddewar@ihug.co.nz) Estrarano de NZEA, ĉefdelegito de UEA

David Ryan [kiwimex@xtra.co.nz](mailto:kiwimex@xtra.co.nz) Vicprezidanto de NZEA

Dennis Pease [dbp@ihug.co.nz](mailto:dbp@ihug.co.nz) Estrarano de NZEA

Don Rogers [rogers@ihug.co.nz](mailto:rogers@ihug.co.nz) eks-prez., estras la ttt-hejmpaĝon de NZEA

Gwenda Sutton [sir\\_lancelot@compuserve.com](mailto:sir_lancelot@compuserve.com) ex-ĈD, ktp

Howard Gravatt [hgravatt@ihug.co.nz](mailto:hgravatt@ihug.co.nz) Sekretario de NZEA

Marieke Bax, help-sekretario, ne havas komputilon.

• **Franko Luin kreis Esperantan Salutkartaron** ĉe <http://esperanto.nu/bildogramo/>. Oni povas elekti

inter tre multaj bildokartoj, enskribi proprajn tekstojn, kaj sendigi senpage al amiko, konato, kc. Via redaktoro gratulas Frankon pro lia iniciativo, kaj forte rekomendas la bildokartaron al ĉiuj retuzantoj.

- **Retlegiloj** (Anglalingve: Browsers): Retpaĝoj kutime uzas aŭ la sistemon Latino-3 aŭ la sistemon Unikodo, por prezenti la Esperantajn literojn ĝuste. Tre multaj Esperantaj retsitaj donas al la leganto la eblon elekti inter Latino-3 kaj Unikodo. La retlegiloj tamen ne estas egale bonaj por tiu celo. Spertoj de via redaktoro kaj de aliaj legantoj indikas ke:

*Por Windows-komputilantoj:* la sistemo Latino-3 utiligeblas bone per Netscape; la sistemo Unikodo utiligeblas bone per Internet Explorer. (Netscape maladekvatas por Unikodo, kaj Internet Explorer maladekvatas por Latino-3, laŭ raportoj de uzantoj.) Kompreneble, necesas havi Esperanto-tiparojn Latino-3 aŭ Unikodajn por tiuj retpaĝoj. Latino-3-tiparojn oni povas trovi ĉe la retpaĝo <http://www.esperanto.org.br/arquivos/tiparo/Tiparo.html>.

*Por Macintosh-komputilantoj:* Kaj Netscape 4.7 kaj la nova retlegilo iCab (havebla senpage ĉe <http://icab.de/download.html>) ebligas legi la Esperantajn Latino-3-retpaĝojn ĝuste. Por Netscape, elektu la klavararanĝon "user-defined" en la Tipar-submenuo de la Preferoj-Menuo. Por iCab, elektu UTF-7 aŭ UTF-8 en la Tekst-enkodiga submenuo de la Aspekto-menuo. Kompreneble oni ankaŭ devas elekti Latino-3 tiparon. Esperantaj Latino-3-tiparoj haveblas senpage ĉe la redaktoro de *ESK*. Bedaŭrinde, Internet Explorer ne aperigas la Latino-3-literojn ĝuste, sed

aperigas c<sup>^</sup> anstataŭ ĉ, g<sup>^</sup> anstataŭ ĝ, kc. Neniu por-Macintosh-a retlegilo ebligas legi Unikodajn paĝojn tute ĝuste; la paĝoj legeblas, sed anstataŭ ĉ aperas c<sup>^</sup>, anstataŭ ĝ, g<sup>^</sup> kc., tamen, neniu speciala tiparo estas necesa. Laŭprognoze, Macintosh-sistemo X, aperonta jarfine, ebligas laŭregulan Unikoduzadon, tamen ĉu la retlegiloj subtenos tion estas ankoraŭ nesciate.

Menciinde estas ke uzantoj de komputiloj Macintosh trovas tre utila kaj interesa la diskutliston e-mac, kiun oni povas aliĝi per mesaĝo al: [e-mac-request@esperanto.se](mailto:e-mac-request@esperanto.se)

- **La Oka internacia Esperanto-semajno de la kulturo kaj turismo** okazos de la 30a de septembro ĝis la 7a de oktobro 2000 en la urbo Blanes, provinco Girona, Katalunio (Hispanio). Pliajn informojn de: [luis\\_serrano@mixmail.com](mailto:luis_serrano@mixmail.com).

- Tre interesa, klare verkita, kaj leginda estas la nova retmagazino de Fanko Luin, *Ĉaŭ*. Ni rekomendas legon, ĉe la adreso <http://www.algonet.se/~inko/retmag/>. Ĉe la sama adreso vi trovos preskaŭ centon da Esperantaj tiparoj por Macintosh!



Franko Luin

- **La Dua Esperanto-Kongreso de la Hinda Oceano kaj Orient-Afrikan Landoj** okazos 24-26 aŭgusto 2000, en Madagaskaro. Kontaktadreso: Malagasa Esperanto-Asocio, Boîte Postale 3171, 101-Antananarivo, Madagaskaro. Se vi deziras partopreni bonvolu kontakti tiun adreson kiel eble plej baldaŭ. □

## ANALOJ DE 1999

### de DIPLODOKO



Nia Verkinto

En la lasta jaro de la 20-a jarcento okazis multaj katastrofoj, naturaj kaj homfaritaj.

**En Venezuelo** estis terura falego de krutaj klifoj, sekvita de pluvego kaj la glitado de koto, kiu kovris kaj englutis milojn da homoj. Tutaj urbejoj malaperis, aŭ lasis nur kelkajn konstru-aĵojn super la nova nivelo kiel memorigilojn de la antaŭa feliĉa vivo.

**En Usono** estis uragano kiu flugigis tra la sudo, kuntrenante gravajn perdojn kaj de konstruaĵoj kaj de loĝantoj.

**En Aŭstralio** okazis ŝtormo kun hajleroj tiel grandaj kiel tenispilkaj, kiuj frakasis la tegmentojn de aŭtomobiloj kaj de domoj. Oni devis provizore kovri la truegojn per forta tolo aŭ kanvaso ĝis oni povos trovi ripariston.

**Fine, en Eŭropo** en decembro estis grandega ŝtormo kun ventegoj de la nordo ĝis la sudo de la kontinento.

**En Parizo** multaj arboj en la historiplenaj ĝardenoj de la Palaco de Versajo estis rompigitaj aŭ elradikigitaj; kaj eĉ kelkaj pecetoj de la Katedralo de Notre Dame estis forrompigitaj. La fiera franka registaro devis peti helpon de aliaj landoj de la Komunumo/Unio por restarigi la elektron por la loĝantoj de Parizo. Plej grava estis la efiko de la ŝtormo sur la

marbordo, kie petrolŝipo rompiĝis kaj verŝis sian gluecan enhavon sur la plaĝojn, mortigante la ostrojn, kardiojn kaj mitilojn, kiujn portis en Dublino la bela Molly Malone.

#### *Politikaj Ŝtormoj:*

Sed estis ankaŭ politikaj ŝtormoj en multaj partoj de la mondo en 1999.

**En Balkono** la armeo, kaj super ĉio la aerarmeo, la aviadiloj de NATO, batalis kontraŭ Jugistoj por devigi ilin lasi en paco la loĝantojn de Kosovo, el kiuj multaj estis rifuĝintaj en najbarajn Islamajn landojn. Bedaŭrinde oni ne ĉiam havis bonan, eĉ kvankam sekretan, informaĵon, kaj unu fojon oni eĉ atakis la Ĉinan ambasadejon, kio kaŭzis venteton ĉe la registaro en Pekino, la nuna Bajĝingo.

**En Brutio** la disputego pri la morto de la Princino Diana ankoraŭ daŭris. Oni sugestis ke la kaŭzo de la mortiga akcidento ne estis nur la prema sekvado de la aŭtomobilo de Diana fare de la ĵurnalistoj, sed ke la Bruta sekreta servo organizis la aferon, por ke Diana ne edziniĝu kun fremda Egiptano. La reĝa familio tiel indigniĝis ke kiam alvenis la kristnaska sezono, Ŝia Reĝina Moŝto decidis ke ŝi ne povas, kiel kutime, fari sian butikumadon en la fama vendejo Harrods, ĉar ĝi estas estrata de la patro de la amiko de Diana, la patro kiu faris la akuzojn pri ŝia morto. Kiam oni proponis ke eble la Duko de Edinburgo, la kunulo de la Reĝino, ankaŭ respondecis pri la tragedio, kvankam en la vendejo estas sanktejo al la memoro de Diana, oni decidis ke oni forprenu de la konstruaĵo la ŝildon kiu

indikas reĝan aprobon!

**Estis batalo en Brutio** ankaŭ inter la laŭheredaj lordoj kaj damoj kaj la Ĉefministro, Tony Blair, kies registaro fine elĵetis ilin el la Parlamento. Estis granda revolucio en la konstitucio kaj tradicioj de la Bruta popolo. Samtempe la Kimroj kaj la Skoltoj ekzercis siajn aŭtonomiajn rajtojn por starigi apartajn kvazaŭparlamentojn; kaj eĉ la Irlandanoj de la nordaj provincoj faris pacon kun siaj sudaj najbaroj, laŭ kio la Brutoj ne plu havos regadan rolon en tiu sprita insulo sendependa.

**En Aglolando**, dum internacia konferenco en Seatlo pri la internacia komerco, ĉiuj estis sendormemaj kaj nokte estis tumultoj en la stratoj. Tio malofte okazas en Aglolando, kaj la amuzega Ridigema Klintono, la edzino de la Prezidento, tiel maltrankviligis kaj ektimis pro la sovaĝaj Verduloj, ke ŝi decidis transloĝiĝi el la Blanka Domo kaj ekloĝi en Novjorko, mirinda urbo kie ŝi esperas trovi postenon kiel senatano. Monika Lewinsky, la fama amikino de Vilĉjo Klintono, jam trovis laboron ĉe Jenny Craig, kiu pagos al ŝi \$1 000 000 se ŝi sukcesos perdi nur 17 kilogramojn de sia pezo!

Feliĉe Aglolando ne devis batali kontraŭ Panamo, sed trankvile transdonis sian teritorion en Mezameriko kune kun la administrado de la Kna-lo.

**En Urslando** la konfliktado inter la komunistoj kaj la novaj ursaj kapitalistoj daŭris, kaj ankaŭ la militoj kontraŭ landetoj de la periferio. En Mus-kovo Prezidento Jelcin penis amuzi la popolon, por eviti ribelon. Sed pro sia malbona sano, li ne povis danci tiel bone kiel kutime kaj tuj an-

taŭ la fino de la jaro li decidis emeritiĝi. Kiel donacon al la nacio por la Nova Jarmilo li nomis kiel anstataŭanton, kiel la provizoran Prezidenton, sian amikon Vladimir — tiel la arlekenon sekvas Putino.

**En Indonezio** konstante okazis tempestoj inter la kristanoj, Ĉinoj kaj islamanoj en la eksteraj insuloj, ekzemple Sumatro kaj Ambono. Aŭstralio, kiun oni longe konsideris foran antipodon de Eŭropo, troviĝis en 1999 en la centro de konfliktegoj. La militoj de Okcidneta Iriano (Papuo) kaj en la insulo Bougainville ne estis tre aktivaj, dank' al Dio, sed estis vere granda ciklono en Orienta Timoro. Tie la tielnomitaj Unuiĝintaj Nacioj organizis referendumon laŭ kio la homoj de la antaŭa Portugala kolonio devis decidi ĉu ili deziras esti sendependaj aŭ nur aŭtonomiaj en la Indonezia Imperio. La Indonezia armeo kaj polico kuraĝigis la loĝantojn decidi por nura aŭtonomio, kaj ĉar ili fakte preferis regi sin mem la Timantoj estis persekutataj, kaj iliaj konstruaĵoj detruitaj. Sed la noblaj Aŭstralianoj (kiel raportis Stefan Maul en *Monato*) tuj kanguruus al Dili, kaj tie organizis koncertojn por la liberaj homamasoj. Ili eĉ sendis milojn da pupaj koaljoj por la timantaj infanoj.


**Dumtempe en Aŭstralio** mem okazis seriozaj tumultoj pri la Olimpiaj Ludoj de la Jaro 2000 — ĉu oni koruptis la organizantojn per senkostaj ekskursoj kaj stipendioj — ĉu oni vendis nedemokratie biletojn por la eventoj — ĉu oni malŝparis monon importante marĉajn muzikarajn? Kvankam la sportejoj estis bonege finkonstruitaj 9 monatojn antaŭ la komenca dato, la ŝtormoj daŭris.

*En Esperantujo:*

**En Esperantujo** estis la kutimaj disputoj, inter tiuj kiuj konsideris ke la Movado estas regno por favori kaj antaŭenigi Esperanton, kaj tiuj kiuj aspiris per Esperanto starigi kulturan Civiton. Kun Satano Kep Enderby kiel Prezidanto, la ĉiujara Universala Kongreso en Berlino bone sukcesis, sed estis multe da varma aero pri la kongreso de la sekvonta jaro. Oni ne ŝanĝis la decidon kunveni en Telavivo en Israelo, sed oni devis pledi, petegi, en la gazeto *Esperanto*, ke oni kontraŭbatalu tiujn kiuj eldiris sentojn kiujn oni povus interpreti kiel antisemitajn.

**Samtempe UEA** havis siajn suk-

cesojn. La laboro en Azio estis kronita per la Dua Azia Konferenco en Hanojo. Kunveno de registaraj organizaĵoj en Seŭlo petis al UNESKO kaj UN pritrakti la problemon de Lingvaj Rajtoj. Kaj UEA estis akceptita kiel partnero por kolekti subskribojn por la granda Petskribo de la Jaro 2000, celante idealan mondon en kiu ĉio estos paca kaj verda! □



## Rezultoj de Eseo-Konkurso en Nov-Zelando de David Ryan

Meze de la pasinta jaro kaj dank'al propono kaj financa subteno donita de unu el niaj membroj, la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio organizis tutlandan eseo-konkurson por gejunuloj.

Ni sendis propagandilojn kaj leterojn al diversaj lernejoj, bibliotekoj kaj universitatoj tra la tuta lando kaj ni invitis ke gejunuloj verku eseon en iu ajn lingvo pri la sekvanta temo: "Why Esperanto will be the international language for the new millennium/Kial Esperanto estos la internacia lingvo en la nova jarmilo". Ni ofertis monpremiojn kaj ni donis la adreson de nia hejmpaĝo por plifaciligi studadon pri la temo.

Je la komenco estis por ni tute nekonata afero ĉar ni ne sciis kiom da gejunuloj partoprenos.

Finfine, ni ricevis sufiĉe multajn bonkvalitajn eseojn inter kiuj ni elektis la sukcesajn eseojn. Ni donis premiojn al la verkintoj de la kvar plej bonaj eseoj kaj al ĉiuj verkintoj ni donacis senpagan unujaran NZEA-membrecon.

La eseo-konkurso estis granda senpaga propaganda sukceso por NZEA. Aperis sufiĉe elstara artikolo pri la konkurso kaj Esperanto en senpaga semajna ĵurnalo de Christchurch, unu el la ĉefaj urboj de Nov-Zelando, kaj ŝajnas ankaŭ ke multaj personoj legis nian hejmpaĝon.

Ni nun intencas sendi informojn al la lokaj tagĵurnaloj por pli propagandi pri la rezulto de nia eseo konkurso.

La venkintoj estos invititaj aperigi siajn eseojn en *ESK* □

# NOVA EKSPOZICIO ĈE KONGRESO DE LINGVINSTRUISTOJ

de Jennifer Bishop

La 31an de marto 2000, Melburna Esperanto-Societo, per sia nova kaj bonaspekta ekspoziciilaro, viciĝis kun eldonejoj, makleristoj pri eksterlandaj interŝanĝoj, kaj lingvasocioj por prezenti allogaĵojn pri Esperanto al la 400 partoprenantoj en la Kongreso de Lingvinstruistoj.

Inter niaj prezentaĵoj estis la du vidbendokursoj *Mazi kaj Esperanto-Pasporto al la*

*Tuta Mondo*. Deĵoris Miranda Lutz kaj Jennifer Bishop, kun granda helpo de Frank Braham, kiu portis kaj rapide muntis la ekipaĵon. Sur tablo antaŭ la tabularo troviĝis lernolibroj,

la teksto de la vidbendokursoj, kaj multaj fordonataj informiloj, kun speciala folio pri la Einihovichi-Vojaĝstipendio.

Dum kelkaj jaroj MES membrigis Jennifer-on al MLTAV. Ŝi ankaŭ oficiale prezentis Projekton EKPAROLI ĉe la tutlanda Kongreso en Hobarto en 1997, kaj alparolis individuajn instruistojn.

Tamen nun estas konstatite ke ŝanĝi la rilaton al kvazaŭkomerca afero eble pli efikas por disvastigi konon pri Esperanto. Kontraŭ pagita kotizo de \$150, nun eblas reklami per du duonpaĝaj informiloj dum la jaro en la prestiĝa revuo *Languages Victo-*

*ria*, aŭ per dissendo de la aliĝilo al la AEA Somerkursaro al ĉiuj membroj de MLTAV.

La ne-priesperantaj prezentaĵoj ĉe la kongreso emfazis plejparte la rolon de teknologiaj instruiloj, de praktikaj ideoj por instigi intereson en la klasĉambro, kaj de profesicela lernado de lingvoj, prefere de Aziaj lingvoj. Dum unu sesio, reprezentanto de

Asia Link substrekis la neceson ĉiam inkluzivi instruadon de kulturaj kutimoj kaj moroj por eviti senkonsciajn insultojn aŭ miskomprenojn. Ĉu eble produkti li-

breton pri tiaj aferoj en Esperanto estas farinda projekto?

Afero kiu aparte valorigis la tagon, krom alparoli diversajn interesoatojn, inkluzive docentinon ĉe Universitato Deakin, kiu forprenis informilojn por meti sur aviztabulon, estas komento de studentino de la japana lingvo ĉe Universitato Monash:

“Mi ofte rigardas la afiŝojn sur la pordo ĉe la Fakultato de Edukado. Plejparte la pordoj estas nudaj, do mi ĝuas la interesajn dekoraciaĵojn. Dum miaj studoj mi ankaŭ sopiras ofte je pli facila lingvo, kaj jen Esperanto!” □







CIMERLINUS: “Cosmografia universalis ab Orantio olim descriptia”  
Venezio? 1566

Noto de la redaktoro: mi trovis ĉi tiun mapon per la Interreto, antaŭ kelkaj semajnoj, sed kiam mi denove serĉis ĝin, esperante iel trovi pli da informo, mi ne sukcesis retrovi ĝin. Se iu leganto scias la originon de la mapo, bonvolu informi min, por ke mi povu ĝuste referenci ĝin en sekva numero de *ESK*. Mi ankaŭ ne povis trovi menciojn pri Cimerlinus aŭ pri Orantius (?), kiuj verŝajne estas Latinigitaj formoj de nacilingvaj nomoj. En la mapo, rimarku ke la Suda Lando estas ankoraŭ laŭimage desegnita, kaj ĝin tuŝas la pinto de Suda Ameriko! □

## NOVA PARDONPETO DE ODLO BOKSERP

Unue, kaj ĉefe, mi deziras pardonpeti ke mia pardonpeto mankis en la antaŭa (marto-aprila) numero, kaj mi deziras pardonpeti ke mia pardonpeto pri mia pardonpeto estas devigita de nia Plejkompata Ĉiamsenlimama Neniavvenĝemanka Reaktoro, kiu minacis denove manĝigi min per nur presinko se mi ne tuj diskonigos mian agnoskon pri mia laŭ li “aroganta” prezento de du ja sinsekvaj kalendaroj en du numeroj de *ESK* laŭ mi tute ĝustaj, kvankam nia Plejsaĝa Plejsensprita Plejduboplana Plejmalfidoplana Plejpedanta Reaktoro insistas ke ili estas malĝustaj, kion mi plene kontestas kaj pri kio mi jam apelaciis al la Internacia Kortumo en nia amata kontinento Antarktiko kiu pro ia nekonata kialo mankas en la mapo sur la ĉiantaŭa paĝo ĉar ial la desegninto plene konfuzis kun nia gloroplana Aŭstralazia kontinento-plus-insulnacio (kvazaŭ iel Aŭstralio estas nur nacikontinento sed Novzelando tamen estas la tuta Azio, kion mi tute ne kredas kaj mi defias iun ajn geografiiston pravigi tiun misnomon), kaj krome kaj plejindignige nia Reaktoro akuzis min ke mia verkadostilo estas neklara kaj nekomprenbla. Nu!

Kiel mi diris, aŭ eble mi ne diris, ĉar mi ne volas kapdolorigi min per tralego de la supra alineo por serĉi la aferon, aŭ mankon de la afero, depende de la faktoj, en Antarktiko kiu ja ne estas ligita al Aŭstralazio ĉu aŭ ne mis prezentata pernome kiel la tutaj kontinentoj Azia kaj Sudaj samempe, efektive... nu, jam mi forgesis kion mi intencis diri, do mi skribu nun punkton. Jen: .

Ĉar mia punkto nun estas tuta klara — uzu lupeon se vi ne klare vidas ĝin — sed ne uzu lupon, tiu nur glutos vian avinon, nepre insistu ke enestas la litero *e!* — nu, ĉar mia punkto estas tute klarigita, mi transiros nun al mia dua punkto.

Ĉu vi vidis ankaŭ tiun punkton? Se ne, aĉetu pli kapablan lupeon.

Kaj nun cele al mia kvina punkto (jes, la *kvina*, ĉu vi forgesis enkalkuli la punktojn ĉe la fino de miaj antaŭaj punktoj? —

Temas pri la fakto ke la geografiistoj, kaj ankaŭ la kalendaristoj, efektive, kvankam ili uzas miajn servojn

por siaj verkoj, ili neniam mencias min kiel sian ĉefan kunlaboriston (*Kava Redaktoro: Bonvolu peti la Akademion decidi ĉu devus esti "sian ĉefan kunlaboriston" aŭ "lian ĉefan kunlaboriston. Min tute konfuzas tiaj aferoj. Dankon.*) (Se vi ne tute klare legis mian privatan prigramatikan noton al nia Reaktoro, bonvolu uzi la lupeon, aŭ eĉ la lupon se tion vi aĉetis, por vidi pli klare.), kaj tio estas vere krimo, ĉu ne? Aŭ eble delikto. Aŭ eble misfaro alie kategoriigita de la aktuala juro.

Do, mi ripetas aŭ eble nur la unuan fojon diras — ke se miaj du kalendaroj ne plaĉas al vi, nur diru, kaj mi volonte informos vin ke vi povas akiri alian senpage ĉe kiu ajn apoteko kaj multaj aliaj ejoj.

Odlo



LA AŬSTRALIA KAJ LA  
NOV-ZELANDA  
ESPERANTO-ASOCIOJ

**Aŭstralia Esperanto-Asocio**

**Prezidanto:** *Ron Gates*, Wangarang,  
MSF 2001, Armidale NSW 2350.  
☎ kaj faksilo: (02) 6772 3856.  
[rgates@metz.une.edu.au](mailto:rgates@metz.une.edu.au)

**Vicprezidantoj:**

Vera Payne, 36 Donegal Rd, Floreat  
Park WA 6014.  
[vpayne@cygnus.uwa.edu.au](mailto:vpayne@cygnus.uwa.edu.au)

Jenny Bishop, 39 Hill St, Hawthorn  
Vic 3122.  
[jenny.bishop@education.monash.edu.au](mailto:jenny.bishop@education.monash.edu.au)

**Sekretario:** Bob Felby, 6 Dorset St,  
Semaphore Park SA 5019.  
☎ (08) 8242 1460.  
[esperantobob@picknowl.com.au](mailto:esperantobob@picknowl.com.au)

**Kasisto:** Margaret Inglis, 4 Mayfield  
Drive, Mt Waverley Vic 3149.  
☎ (03) 9807 8589.  
[minglis@netspace.net.au](mailto:minglis@netspace.net.au)

**Vickasisto:** Dianne Lukes, c/o Post  
Office, Meringandan Qld 4352.

**Nov-Zelanda Esperanto-Asocio**

**Prezidanto:** Bradley McDonald, PO  
Box 12 103, Auckland 1135.  
☎ 09 579 4767, faksilo 09 579  
1070.  
[neelam@voyager.co.nz](mailto:neelam@voyager.co.nz)

**Sekretario:** Brian Fox, PO Box 8140,  
Symonds Street, Auckland 1035.  
☎ 09 817 8244.  
[brianandjackie@abztrak.co.nz](mailto:brianandjackie@abztrak.co.nz)

**Kasisto:** Jackie Fox, PO Box 8140,  
Symonds Street, Auckland 1035.  
☎ 09 817 8244.  
[brianandjackie@abztrak.co.nz](mailto:brianandjackie@abztrak.co.nz)

**KOTIZOJ:**

**Aŭstralia Esperanto-Asocio:**

AŬ\$30 por individuo aŭ klubo (+\$5  
por familiano[j] ĉe la sama adreso);  
\$20 por studento aŭ pensiulo; asocia  
membreo: \$10. Bonvolu sendi vian  
kotizon al la Kasisto de AEA: Margare  
t Inglis, 4 Mayfield Drive, Mt Waver  
ley Vic 3149.

**Nov-Zelanda Esperanto-Asocio:**

NZ\$40 por individuo, \$50 por geed  
za paro, \$10 por studento aŭ junulo (<  
20-jara). Klubo: \$1 por ĉiu ano. Bon  
volu sendi vian kotizon al la kasisto:  
Jackie Fox, PO Box 8140, Symonds St,  
Auckland 1035.

**Unuopaj ekzempleroj de *Esperanto sub la Suda Kruco*:** Por mem  
broj, AŬ\$3 + poŝtsendkosto; por  
nemembroj, \$4.25 + poŝtsendkosto.  
Mendu de la Libroservo de AEA.

**Abonoj ekster Aŭstralazio:** En  
Usono kaj Kanado: US\$26. Mendu ĉe  
ELNA. Aliaj landoj: €23.70, pagu al la  
konto aeal-w de la Libroservo de la  
Aŭstralia Esperanto-Asocio ĉe UEA.

**Artikoloj** de aŭtoroj nomitaj estas  
© 2000 de la respektivaj aŭtoroj. Ĉio  
alia en ĉi tiu numero de *Esperanto sub  
la Suda Kruco* estas ©2000 de la  
Aŭstralia kaj la Novzelanda Esperan  
to-Asocioj. Represo de enhavaĵo estas  
permesata, kondiĉe ke la fonto estas  
nomita.

**Ĉi tiu numero** de *ESK* estas  
kompostita kaj aranĝita de Donald  
Broadribb per iMac DV SE, la pro  
gramo uzita estas FrameMaker. La  
tiparo uzita estas New Century  
Schoolbook. La reteldono estas  
preparata per Power Macintosh 7200,  
per Acrobat.

## OUR TRANSLATION CONTEST

Our readers may enjoy trying their hand at a translation into Esperanto of the following text (prepared by Marcel Leereveld). The deadline for entries to be received is June 2. Every entry will receive a book prize, selected by our editor. The best entry will receive a special book prize, also selected by our editor. Judges of the contest will be Marcel Leereveld and the editor. Send all entries to the editor: Donald Broadribb, PO Box 643, York WA 6302, Australia. Entries may also be sent by e-mail to [donaldbroadribb@mac.com](mailto:donaldbroadribb@mac.com)

*The text to be translated:*

### Our Amazing Brain Driving Us Along

Have you ever stood still, or kept going, and looked at all the things your brain absorbs every fraction of a second while driving a car?

Every fraction of a second our eyes, and to a lesser degree our ears and noses and feelings in our hands, transmit dozens of new impressions to our brains, which on the spot work out how to react and drive when we are on the road.

Every fraction of a second the brain, that super-computer, combines the following necessary impressions into an overall picture by which the brain works out an ever changing pattern of driving needs.

There is first our position on the road, and the positions of the many other cars around us, several in front and several behind us. At the same time our brain judges the approximate speeds of our own as

well as of the cars around us.

There are further necessary impressions drawn by our brain from the nerve cells at the back of our eyes: we need to know whether any car is going to change, or is changing, its lane, or is going to overtake us, or whether we have to overtake.

We have to judge how best to help the flow of traffic and whether we can and should assist, by means of our way of driving, any other driver who needs such special help from us.

We have to be aware of, and take into consideration, the possibility of any unforeseen animal, or even child, near or on the road and how to react to such a situation and with regard to the other traffic.

Then we are constantly and acutely aware, all the time, of any possible mistake going to be made by any of the cars in front of us and behind us, when we have to slow down or stop, or by the traffic join-

ing the road from side roads, and our brain works out how to react to each of the several mistakes that can be made by any car.

We are acutely aware of these possibilities, or should be.

Our speed often depends on the speeds of other traffic, especially in front of us. We constantly assess the safe distance between us and the cars in front, depending also on the traffic behind us.

So we regularly have to look in our rear vision mirrors.

Before traffic lights we assess our speed, also considering the timing of the lights.

And our eyes are also constantly watching the road, not only to register where we are driving, but also to expect something lying on the road that we may want to avoid.

And all these above mentioned impressions change constantly, so that our brain has to compute a new overall picture every fraction of a second.

Amazing and unbelievable.

But that's not all: every now and then we have to look in our outside rear vision mirrors, and to the traffic on both sides of our car.

Long before traffic lights we have to judge the time in such a way that we don't have to brake too much, because braking means wasting petrol: the more one brakes, the less economically one drives.

And also the more forward looking we drive in general, the less accident prone we are.

We also have to look at our speedometer, in case we ought to drive more slowly, at least if we are not slowing down so much that we will be a nuisance to other traffic: the road belongs to them as much as to us, and even more so when we try to get onto it.

If only our driving instructors had taught us that the road belongs to all other drivers except us, so long as we try to get onto that road — how many accidents this golden rule might prevent!

We also watch our dashboard regularly to see whether the indicators have gone back into their normal position.

We also consider whether we should reopen the airstream from outside, if we have closed them because of excessive exhaust fumes from the cars in front.

Apart from that, we keep an eye out for whether any warning signs (overheating, insufficient oil, etc.) have come on.

On top of all that, our computer brain may have to or want to incorporate the following visual registrations:

(1) If it rains or there is mist, we adjust our speed and we turn on our lights, ensuring that we have not turned on the parking or high

beam lights in the process;

(2) If it is dark we have to react by dimming our lights when we are half a kilometer behind another car or when there is oncoming traffic;

(3) If we want to economise more on petrol, we regularly look at the road surface to pick out and use the rougher parts;

(4) Good drivers will put the motor into a lower gear when going down slopes, to save on brake wear and to give better control of the car;

(5) While watching other cars in nearby traffic, our brain also composes a psychological picture of each driver, to anticipate how those drivers are going to act in and react to traffic situations (constantly working out how the other drivers are acting and are going to act should be part of our driving instruction);

(6) Not only do we constantly make up our mind how to escape an accident (e.g. whether to swerve left or right or not at all) in case another driver makes a mistake, far or close ahead or from a side road (that often happens), but we must also plan how to act in case we get a sudden flat tyre or motor trouble;

(7) If with manual gears, we also need to feel and hear in which gear we are or should be;

(8) If we have power steering, we also need a more sensitive, less relaxed grip on the steering wheel, to

rectify constant direction changes due to slight unevenness in the road surface reacting on the steering wheel.

Our speed and our way of driving are dictated by all the practically simultaneous impressions being computerized by our brain.

We learn that, when we learn to drive.

What we often forget to learn is to get used to constantly thinking how to be helpful to other drivers, so as to help the proper flow of traffic for the good of everybody.

No wonder that in Australia we have bad and dangerous drivers, the like of which are practically non-existent in Western Europe.

Perhaps those narrow minded brains on our roads have never thought to learn the fine art of driving and of fitting in with traffic society.

Marcel Leereveld

Postnote:

This essay is not meant to be a guide for good driving: good driving and good traffic sense include several more habits both useful and necessary for us and other drivers. For example: when we are driving slowly, to signal to following cars that it is safe for them to pass us; or the habit of indicating to a following car, by pressing slightly on the brake pedal, that we may very soon have to slow down or brake, without braking yet; and so on, and so on. M.L.

## ESPERANTO WORD IN ENGLISH?

### NOTED IN *AUSRALIAN STYLE*

“A term for a teacher was noted in NSW by Malcolm Reid, namely *educanto*. This seems to be a borrowing from Esperanto, where it would mean literally “one who educates”. Despite the spread of Esperanto as an auxiliary language round the world from eastern Europe to the Far East, little of its vocabulary seems to be borrowed into other languages. Rather the borrowing works in the opposite direction.”

*Australian Style* is published by the Dictionary Research Centre at Macquarie University (Address: *Australian Style*, c/- Ausinfo, GPO Box 1920, Canberra ACT 2601. The above text comes from Volume 7 no 2, December 1999, p.4, where it forms part of a column titled “From the Editor”.

---

---

## PAUL DESAILLY IN SAMOA

Paul Desailly is going to Samoa for three months to teach Esperanto. In the first instance he will find students among the Baha'i community, and will expand into the general community as conditions permit.

The Oceania Commision of the Universal Esperanto Association has arranged this with help and funding from the Australian Esperanto Association, the New Zealand Esperanto Association, and the Universal Esperanto Association in Rotterdam.

Paul will leave Melbourne on Friday 7 April 2000 on flight UA4348 and arrive in Auckland at 1230. He will spend a few days in Auckland speaking to Esperanto and Baha'i groups about his venture and about Esperanto.

He will leave Auckland on Wednesday 12 April at 2359 on flight NZ70 and arrive in Apia on Wednesday 12 April at 0500 (across dateline). He has two days' accommodation at the Pacifica Inn in Apia.

Paul will return from Samoa on Saturday 8 July at 0250 on flight NZ61 and arrive in Auckland on Sunday 9 July at 0555. He will again spend a few days in Auckland where he can assess the success of the mission and come up with recommendations for future Esperanto activity in the Pacific.

He will fly back from Auckland to Melbourne on Saturday 15 July 2000.